# HEJS

BULTENO DE

HISPANA ESPERANTO JUNULARA SEKCIO

Nro. 39
Novembro - Decembro 1964

REDAKTORO: Sro. S. ARAGAY
POŜTKESTO 26
Arce, 8, 2.º, 4.ª - CORNELLA (Barcelono) Hispanujo



# Kunveno en la H. E. J. S.

## DELEGACIO EN BARCELONO

ALVOKO

Estas fakto ke nur la solidara komuna agado permesis al ni atingi la plej grandajn entreprenojn en Esperantujo. La historio de nia movado estas plena de realaĵoj plenumitaj dank'al ĉies klopodoj. Tial do, ni esperas ke nia hodiaŭa alvoko skuos, se eble, la generalan konscion rilate la jenan aferon:

Ĝis.nun, nur 23 gesamideanoj abonis la revuon "KONTAKTO". Malgraŭ tio ke la menciita publikaĵo devus esti la tutmonda junulara interkomprenilo, pro diversaj kaŭzoj, plejparte financaj, la suprecitita organo de TEJO ne ricevis la sufiĉan apogon por elvolviĝi sen malfacilaĵoj nek premoj.

Ni, nome de la HEJS-estraro apelacias al la boneco de ĉiuj membroj, simpatiantoj, kaj ankaŭ veteranoj por ke ili bonvolu nepre abonu la plej luksan kaj efikan revuon de nia aktuala momento.

Se ni ne povas partopreni rekte la arangôjn kaj specialajn taskojn de TEJO, ĉar ni estas malproksime de la centra parto de Europo, almenaŭ ni, pere de HEJS abonu "KONTAKTO'N", vera heroldo de nia esperantisma vivo: tiamanjere niaj financaj rimedoj multe kaj efike helpos al la disvastigado de ĝi kaj samtempe ni montros nian praktikan esperantistecon.

La jara kotizo estas: I28 pesetoj.

Ke "KONTAKTO" estu nia plej alta standardo kaj taŭga perilo !

La Estraro

==============

## LA NOVAJ VESTOJ DE LA IMPERIESTRO kaj du aliaj fabeloj

## DE H. C. ANDERSEN

Noveldonita libro de Eldonejo KOKO, Kolby Kaas, Danlando, kolorilustrita de Gustav Hjortlund. Tradukita el la dana originalo de Ib Schleicher. Kontrolita de la literatura Komitato de SAT. 52 paĝoj, el kiuj 24 tutpaĝaj kolorilustraĵoj. Formato 27 x 21 cm. Prezo 30 steloj aŭ 130 pesetoj.

Sama formato kaj ekipo kiel " La Marvirineto", kiu aperis en 1962 ankaŭ ĉe Eldonejo KOKO.

La libro konsistas el tri fabeloj de H.C. Andersen, en sama vesto kiel ĝia antaŭulo "La Marvirineto". Tiu vesto, interalie, pravigas la ekziston de du tradukoj de la samaj verkoj. Ne malpli ol 24 tutpaĝaj kolorilustraĵoj, krom multaj nigre-blankaj, plezurigas la okulojn de la infanoj inter 4 kaj 84 jaroj.

1. En "La Novaj Vestoj de la Imperiestro" H.C. Andersen satiras pri la homa snobeco kaj pri ĝia blinda fido al aŭtoritatuloj, kion fine malkovras naiva infano.

2. En " Hans -fuŝulo" ni renkontas en la fabelo klasikan triopon, el kiu la lasta faras la heroon, kiu gajnas la princinon. La du fratoj ŝajnas esti favoratoj al sia mano kaj koro, sed venkas la "stulta", senperanima kaj gaja Hans-fuŝulo.

3. La tria fabelo " Estas tute certe" pritraktas nian emon troigi kaj klaĉi. Eble ĝi prenas la unuan rangon en la mondliteraturo pritraktanta tiun temon. Ne nur en la lando de H.C. Andersen oni, aŭdante troigon kaj klaĉon, sin esprimas per la signifoplenaj vortoj: "Estas tute certe". Aŭtomate oni citas H.C. Andersen, kio montras la gravan edukan karakteron de la historio.

Tial ne hezitu aĉeti la libron.

Tiu libro simple estas perlo en la mondliteraturo.

P.Z.

-o-o-o-o-o-o-o-o-

## KORESPONDA SERVO

Adreso. S-ro F. Parareda. San Pedro 23 Moyá (Barc.)

--------

Se vi volas korespondi kun junaĝa brazilano kaj interŝanĝi pm.sendu kvanton da arentinaj al :

H.S. Knoedt, R. Aurelio Espinheira, 2 apt 101
Baixa do Bonfin. SALVADOR Ba. Brazilo

-o-o-o-o-o-o-o-

## FINO DE LA JARO

Ĝenerale kiam Asocio finas la jaran periodon, volonte aŭ ne volonte, la estraro kaj membroj deziras scii ĉu sia asocio plenumis ĝian taskon; ĉu la diversaj fakoj sukcesis realigi la petojn de la membroj; ĉu la asocio firmiĝis sian pozicion k.t.p. En tiu ĉi momento mankas al la raportisto la raporton de kelkaj estraranoj, ĉar ili atendas la lastajn novaĵojn; tamen malgraŭ ĉi tiu manko, oni povas konstati ke nia junulara sekcio plenumis bonege sian funkcion en la jenaj aferoj:

Organizado de Junularaj Rondoj Dank'al la kontaktoj kun la samideanoj de Valencio kaj Cheste, okaze de la Jubilea Hispana Kongreso, oni fondis Junularan Rondon en la du urboj. En la venonta bulteno aperos ampleksan informon pri la aktivecoj de la J.R. de Valencio.

H.E.J.S. Barcelona Delegacio Laŭ la lastaj informoj aliĝis al la Delegacio 60 samideanoj, el ili 28 nur kiel abonantoj al la H.E.J.S-bulteno. Regule okazis: Meza kaj Elementa Kursoj gvidataj de Prof. J. Aragay kaj M. García, Kampioneco de tabloteniso, turniro de ŝako kaj du ekskursoj po monate.

Internaciaj Aferoj: T.E.J.O. informis nin ke entute 23 gesamideanoj abonis al la I.J. revuo Kontakto, tiel do malgraŭ tio ke la nuna cifero de abonantoj ne estas tiel grava kiel deziras T.E.J.O. ĝi montras klare ke niaj H.E.J.S.-membroj bone taksis la valoron de Kontakto.

Internacia Junulara Kongreso : Okaze de la lasta I.J.K. de T.E.J.O. en Amsterdam 6 H.E.J.S.-membroj partoprenis en la I.J. Kongreson, tiel do, estas unufoje ke HEJS-grupo ĉeestis la plej gravan internacian junularan aranĝon.

Abonoj: Meze de la jaro oni kreis la specialan kotizon "Dumviva Abonanto", kiel jam indikis pere de la antaŭa bulteno unu samideano, P-ro J. Aragay akceptis aboni sian kotizon laŭ tiu ĉi sistemo. Ĉiuj kiuj deziras helpi kaj faciligi niajn taskojn, bonvolu peti informojn al la Redakcio.

Ankaŭ nia bulteneto iom post iom estas pli legata eksterlande, ĉar abonis ĝin gesamideanoj de Svedujo, Norvegujo, Germanujo, Francujo, Italujo kaj Nordameriko.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Kaj nenion plu, pli vastaj informoj aperos en la venonta bulteno; tamen la menciitaj punktoj bone montras ke nia Sekcio forte enradikiĝas en niaj medioj.

Nome de la estraro kaj propre mi deziras al ĉiuj bonan Kristnaskon kaj Feliĉan Novan Jaron.

La Prezidanto

21-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE T. E. J. O.

OOTU kaj KIOTO Japanujo 8-15-a Aŭgusto 1965

La 20-a memoriga I.J.K. fermiĝis sukcese en Amsterdam. Nun la komenco de la 21-a! Japanaj junaj esperantistoj nun ĝoje anticipas la gajan kaj interesplenan renkontiĝon kun multaj junaj geamikoj el plej diversaj nacioj de la mondo, okaze de la 21-a I.J.K. de TEJO, kiu okazos venonjare, tuj post la 50-a Universala Kongreso en Tokio en la urboj Octu kaj kioto.

Ambaŭ urboj estas jam famaj enlande kaj internacie pro turisma nepraĵo en Japanujo kun tradiciaj kaj pitoreskaj aspektoj. Precipe Kioto estis dum 1200 jaroj ĉefurbo de la malnova Japanujo. La du urboj altiras ĉiujare, ĉiusezone, enorman nombron da vizitantoj enlandaj kaj eksterlandaj al siaj malnovaj vidindaĵoj kaj modernaj feriejoj.

Ni povas diri, ke neniu pentos pri sia partopreno al la 21-a Internacia Junulara Kongreso,ĝuante la gastamon kaj amikecon kaj spertante maloftan aprecadon de japana spirito kiun animas tradiciaj trajtoj kaj modernaj vivkondiĉoj.

Cetere, ambaŭ urboaŭtoritatuloj anjaŭ montras grandan intereson al nia Kongreso kaj promesas favoran subtenon kion ili povas doni.

Ni do kore invitas ĉiujn junajn esperantistojn tra la mondo nepre veni al nia Kongreso, tiel ke ĉi tie montriĝu vera tutmondeco de nia afero esperanta. Ni nin turnas precipe al ĉiuj gesamideanoj junaj kaj pli aĝaj, kiuj nun preparas sin pr la 50-a U.K. en Tokio, kun la sama invito, esperante ke ili ne pre konsideru la partoprenon ankaŭ al la 21-a I.J.K.. Des pli mi tion asertas, ĉar la postkongresaj aranĝoj de la 50-a U.K. havos sian lokon en la sama distrikto de la 21-a I.J.K. kaj eventuale la ekskursoj okazos en la sama kadro.

Cefa loĝejo: Japana Centro de Junulargastejo en Octu apud la lago Biúa, Siga gubernio ( en Kanzai-distrikto).

Kotizoj malpli ol 20 jaroj 1080 pesetoj

20-jaraj kaj pli aĝaj 1200 "

Esperante ke vi kara leganto interesiĝos pri la 21-a IJK kaj atendante vian aliĝon al ĝi, ni vin salutas kun estimo kaj samideana sento.

Sincere via

Yoshimi Umeda Yoshikazu Takeuchi

## 8-a -INTERNACIA SEMINARIO

Kiu okazos de la 27-a de decembro 1964 ĝis la 3-a de januaro 1965 en la junulargastejo de la Imperiestra Kastelo de Nurnberg. Germanio.

Pri la ĝenerala temo

"IDEOLOGIO KAJ STATO " -reciproka influo,realaĵoj kaj mitoj

okazos prelegoj de :

Prof.D-ro Ivo Lapenna,prezidanto de UEA,Londono. (Konceptoj de ideologio kaj ŝtato - kaj - Influo de ideologio je la strukturo de ŝtato kaj juro-).

Prof. Lucien Laurat. Parizo. (Reciproka Influado de ŝtato kaj ideologio- kaj - Kontaktoj kaj kontraŭecoj inter nacia kaj klaza ideologio-).

Docento el Bulgario (Soveta interpretado de marksismo)

D-ro Ing. Giordano Azzi, Como, Italio (Faŝismo)

Ivo Osivav, prezidanto de TEJO,Split Jugoslavio. (Reciproka influo de ideologio kaj ŝtato en la konkreta ekzemplo de postmilita Jugoslavio).

Studprofesoro Ludwig Thalmaier, Landshut, Germanio. ( Kristanismo kaj ŝtato).

Dieter Gernert, stud,mat, Munkeno. Germanio (Komunaj trajtoj de la ideologioj).

Edwin Thomas, sekretario de EJS. Lyss, Svislando. (Kelkaj aspektoj de la svisa demokratio).

Dieter Meiners, naciekonomiisto, Oldenburg, Germanio. (Demokratio kaj ekonomio).

Krom la prelegoj, kiujn sekvos diskutoj, vin atendas tamen ankaŭ pluraj distraĵoj kaj gravaj laborkunsidoj.

HEJS-membroj, petu informojn rekte al la redakcio str. Arce 8-2-4 Cornella.

-o-o-o-o-o-o-o-o-

## Geedziĝoj

Nia kara vicsekretario S-ro Jordi Gumá kaj f-ino Mª Teresa Girona geedziĝis la 6-an de decembro en Barcelono.

Ankaŭ nia estimata samideano kaj regula kunlaboranto de nia bulteno s-ro Juan Vélez kaj F-ino Pilar Setó geedziĝis la 10-an de novembro en Barcelono.

Ni deziras al la estontaj gepatroj multajn feliĉon kaj ĝojon.

## Naskiĝoj

Ankaŭ nia kasisto S-ro R. Jovani kaj sia edzino Prudencia Mesa ĝoje anoncas la naskiĝon de sia unua filino Eva Jovani Mesa, kiu naskiĝis la 30-an de aŭgusto en Hospitalet (Barcelono).

## Nekrologo

Dum la granda pluvego en Villanueva y Geltrú, la akvo eniris en la hejmojn de kelkaj el niaj samideanoj. En Tárrega kie naskiĝis, forpasis le junulo Francisco Serra Castelló, 22 jara, nova kaj entuziasma membro XXX el Esperanto Villanueva y Geltrú, kie loĝis kiel lernanto el Lernejo de Industriaj Elspertizistoj.

-O-O-O-O-O-O-O-O-O-

## OFICIALA INVITO DE ITALA ESPERANTISTA JUNULARO

ITALA ESPERANTISTA JUNULARO INVITAS H.E.J.S.- an(in)on PARTOPRENI LA VENONTAN ITALAN KONGRESON EN LA BELEGA URBO RIMINI-RAVERMA. Oportune oni indikos la daton ĉar momente ankoraŭ devas fiksi ĝin la L.K.K. Petu informojn al la Redakcio.

-O-O-O-O-O-O-O-O-O-

## DELEGACION BARCELONESA de H.E.J.S.

### Casanova 57-6. Barcelona

Tal como se anunció a los socios, el pasado día 17 de Octubre tuvo lugar en nuestro local social, la elección de la junta. Después de varias consultas con los socios fué aprobada por unanimidad los siguientes cargos.

| | |
|---|---|
| Presidente. | Francisco Ruiz |
| Vicepresidente. | Salvador Aragay |
| Secretaria | Magencia García |
| Vicesecretaria | María Roig |
| Cajera | Fanni Coca |
| Vocal Cultural | Juan Vélez |

Actividades Culturales

Durante el pasado mes tuvo lugar la apertura de los cursos de Esperanto elemental y medio; la matrícula continua abierta para los jóvenes que deseen inscribirse.

Visitó nuestra delegación la Srta. Ingrid Carlsson y Srs. Uwe Joachin Moritz y Roman -- Dobrzynski los cuáles entusiasmaron a los asociados con sus charlas.

Actividades Deportivas

Desde primeros días de septiembre se han organizado periódicas excursiones, visitándose: S. Miguel del Fai, Lago Esperanto (En donde su puso una placa), Guillerías, San Feliuet y Tagamenent.

Asimismo en el mes de noviembre se finalizaron los campeonatos de ping-pong y ajedrez.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Para el próximo día 20 de diciembre se está elaborando el programa para celebrar el 1º Aniversario de nuestra delegacion, acto que tendrá lugar a las 17 horas en nuestro local social, Casanova 57-6. El programa provisional consta de las siguientes partes:

Saludo de la Junta
Entrega de premios
Distribución de Obsequios a todos los asistentes
Merienda

La junta invita a todos los asociados de Barcelona ciudad y provincia al acto. Los tiquets costarán 30 ptas. para los muchachos y 20 ptas muchachas. Dichos tiquets podrán adquirirse en Secretaría los jueves y sabados de 7,30 a 9,30 tarde. Esperando vuestra colaboracion. La Junta

## NOTAS DE LA SECRETARIA

Socios que han efectuado el pago de la cotización anual

Srtas. Mª Angela Vilagrán y Amparo Asensi.
Srs. Adolfo López y Tor Caspary.

Nuevos socios. Srta Amparo Asensi y Adolfo López

## FUNDACION " REPRESENTANTE INTERNACIONAL"

Donativos recibidos de nuestros asociados desde primeros de año hasta el momento de preparar esta página.

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Sr. | Ramon Jovani | ....Hospitalet ........ | 150 | pesetas. |
| " | Juan Vélez | .....Barcelona ......... | 15 | " |
| " | Antonio Tomasa | ....Manresa ......... | 5 | " |
| " | J. Cardellach | ....Tarrasa ......... | 150 | " |
| " | Juan Azcuenaga | ....Santander ......... | 40 | " |
| " | J. Damián Canet | ....Alicante ......... | 45 | " |
| " | Eduardo Pons | ....Barcelona ......... | 20 | " |
| " | Francisco Abella | ...Barcelona ......... | 20 | " |
| " | José Climent | ....Barcelona ......... | 20 | " |
| " | Tor de Kaspary | ....Norvegujo........ | 20 | " |
| " | Maderas Callau | ....Barcelona ......... | 120 | " |
| " | Amadeo Lucas | ....Alcoy .... ...... | 50 | " |
| P. | José M. Claramunt. | Villafranca ...... | 10 | " |
| Sr. | Antonio de Salvo. | Italujo ........... | 270 | " |
| " | Petro Nuez ...... | Barcelono ........ | 60 | " |
| " | Edwin Hegges ..... | Nordameriko ....... | 20 | " |
| Srta. | M. Angela Vilagrán . | Barcelona ..... | 20 | " |
| Sr. | J. Aragay ....... | Barcelona ......... | 150 | " |
| | Institución S. F. F. | .Malaga ......... | 120 | " |

Total 1305 pesetas

Nuestra sincera gratitud a todos los donantes

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

LA JUNTA DESEA A TODOS LOS SOCIOS FELIZ NAVIDAD Y PROSPERO AÑO 1 9 6 5 Expresando así mismo su más sincero agradecimiento por la desinteresada ayuda y colaboración prestada en todos sus trabajos.

La Junta.

-o-o-o-o-o-o-

C

# MADERAS CALLAU

Sans, 302 - Teléf. 239 05 24

BARCELONA (14)

# jovani

juegos electrónicos, [illegible] billares,

[illegible]

PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83
HOSPITALET - BARCELONA

# ZURCIDORA

*y*

# TEJEDORA

ROSITA GALBANY

[illegible] 092, bajos
[illegible] 29 41
[illegible]ONA

# ELDONEJO KOKO

[illegible]andb[illegible] 4
K[illegible] H[illegible]
DANDANDO

"La M[illegible]

[illegible]ita

*75 paĝoj. Prezo: 30 steloj*